# La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno


Sendita al :


BELGIO NEDERLANDO GERMANIO

E

*Senlime*

Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno

**En cas de non-distribution, renvoyer à**
H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org


# Trilanda renkontigxo

## *Senlime*

invitas vin al **speciala**

## Trilanda Renkontigxo en Kelmis

Dimancxon, la 15an de oktobro 2006.

## Provizora programo :

10h00 Akcepto per bonveniga kafo - ekspozicio
en trinkejo/restoracio «Select» (Lütticherstr. 264)
11h00 Oficiala parto de la programo : himnoj, salutvortoj,
prezento de D-ro Molly kaj P-ro Roy, teatrajxeto,
senvualigo de portretoj de D-ro Molly kaj P-ro Roy.
12h30 Bankedo (MENUO DECIDOTA)
15h00 Promenado tra Kelmis kaj la iama Prusa Moresnet
17h00 Mangxeto (1 torta peco + 1 kafo en «Select»)
kaj disigxo.

**Aligxilo kaj pliaj detaloj** en nia venonta informilo (2006-4)

**<u>Prezo</u> : 30 EUR** – trinkajxoj neenkalkulitaj
krom akcepta kaj fina kafo.
Kutima rabato da 20 % nur por
- kotizintaj (post 2005/06/30) membroj de ***Senlime***
- infanoj kaj junuloj < 26 jaragxaj.

### *Bonvenon al cxiuj !*

sed… (atendu la precizigojn kaj atente legu la detalojn) :
- Deviga rezervado kaj pago **antaù la 8an de oktobro 2006.**
- Grupa prezo postulas saman programon (mangxo,…) por cxiuj.
- La programo cxi-supra estas nur provizora : ***Senlime*** rezervas al si la rajton modifi gxin kaze de neceso aux cele al plibonigo.
- Logxebleco en Park-Hotelo, 2 rue des Carabiniers, Kelmis (XX-32-87-63.95.30 http://www.parkhotelkelmis.com). **Atentu : *Senlime*** ne peras la logxadon (rezervado, k.t.p.).


**Editeur responsable**
**Responsa eldonanto +**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jacques@senlime.org
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters,
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. Xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
DE-52134 HERZOGENRATH

Informilo aperanta kvarfoje en jaro.

**Jara abono / aligxo : 10 EUR**

**Belgio** : konto 000-0245571-64
IBAN: BE29 0000 2455 7164
BIC: BPOTBEB
Esperanto-Grupo, rue Donckier 22,
BE-4800 VERVIERS
agnoskita de Franclingva Ministerio pri

CULTURE
ÉDUCATION PERMANENTE

**Germanio** : konto 6623201,
Sparkasse Aachen (BLZ 390 50000)
Im Pesch 20
DE-52134 HERZOGENRATH

Kotizoj principe pagendas dum la novjara periodo (decembro aù januaro). La kotizintaj membroj principe gxuas rabaton okaze de aligxo al Trilanda Renkontigxo organizita de ***Senlime***.

# Memoru : Iam, *Amikejo*, *Neuxtrala* Moresneto.

La graveco de la kalamina tavolo en Altenberg [nune en Kelmis] estis kauxzonta konflikton inter Nederlandoj kaj Prusujo kiu eksplodis tuj post la subskribo de la fina akto de la Viena Kongreso, la 9an de junio 1815, kaj povis esti finarangxita nur unu jaron poste dank'al la subskribo en Aachen de provizora landlima interkonsento. Dum 6 monatoj, la negociantoj de ambaux landoj estis elradikigontaj el siaj diplomataj kofretoj malnovajn geografiajn mapojn, topografiajn tabelojn kaj ecx kompason. Sed kiaj estu la klopodoj por konvinki la alian pri la praveco de siaj depostuloj, neniu parto kuragxis konfesi ke la kunfandajxo da zinko kaj kalamino faris latunon, metalon je alta strategia graveco.

Je la subskribado de la kompromiso, treege kaduka vidpunkte de la internacia juro, oni interkonsentis por deklari ke la 250 enlogxantoj kaj la 50 domoj de la regiono provizore apartenis al "kontestata" areo, decido kiu estis kauxzonta dekobligxon de la logxantaro kelkajn jarojn poste : en la neuxtra areo, kontrabando, ebriemo kaj sxteletoj estis kutimaj, dum en la minejo, oni senpauxze laboradis.

La kompanio por mineja ekspluatado "Vieille Montagne" [Malnova Monto] klopodadis, gvide de sia estro Saint-Paul de Sincay, kompensi tiun nekutiman situacion per sociaj rimedoj progresemaj kaj investoj gravaj por la komforto de la laboristoj, la konstruado de pregxejoj kaj la kreado de asocioj. En 1906, Wilhelm Molly estis kuracisto dungita de la entrepreno por prizorgi la laboristojn.

En la regiono mem kie urbestro kaj regxaj komisaroj regule marsxis unu la alian sur la piedojn, oni pripensis aliajn rimedojn por monigi tiun nove akiritan sendependecon. Oni revis pri kazino, sendependa posxtoficejo (posxtmarkoj estis eldonitaj), ecx sendependa sxtato kie oni parolus esperanton : ***Amikejo***…



D-ro. Molly

"Jansmühle" (hodiaux Jansmühle 22) estis kupromuelejo situanta en Prusa Moresnet, kiun la fama zinkentrepreno "Vieille Montagne" akiris en 1848 por enlogxigi sian personaron. Tie, en 1906, franca profesoro, Gustave Roy, renkontis la doktoron Molly, cele konvinki lin apogi la projekton "starigi sendependan Esperanto-sxaton en Neuxtrala Moresnet".

Tiun gravan renkonton, deirpunkton de la esperantista periodo de la nuna Kelmis, ***Senlime*** teatrajxete revivigos antaux vi dum speciala rememoriga 3-landa renkontigxo, okazonta sur la lokoj mem cxi-auxtune, la 15an de oktobro.

En junio 1907, Gustave Roy fondas internacian asocion de esperantistaj komerco-vojagxistoj sidantan en ***Amikejo*** kaj celantan favoradi la internacian komercon per la disvastigo de Esperanto en la mondo de la komerco-vojagxistoj.

La bruo kiun cxiulandaj jxurnaloj faras cxirkaux franclingva brosxuro de Roy "projekto de esperanta sxtato realigebla en ses monatoj" alkondukas al li sindonemajn helpantojn, unue leuxtenanton Giminne, el Bruselo, kiu donacos tempon, paroladojn, monon ; abaton Richardson, veran apostolon ; S-ron Charles Schriewer, tre energian kaj tre inteligentan junulon, konsulon kaj profesoron de ***Amikejo***.

Tiuj tri samideanoj preparos paroladon kiun la Verviers-ano Ruhl germanlingve faros al la logxantaro de Neuxtra-Moresneto. Kiel sekvo de tiu efika kunlaboro, en 1908, starigxos tri esperanto-kursoj. ***Amikejo*** tiam enhavas 4.000 logxantojn kaj 135 esperantistojn, kiuj, en 3 grupoj (infanoj 70, sinjoroj 40, sinjorinoj 25), gvide de la sxtatestro, ricevos en la sxtata lernejo du lecionojn semajne.

Ve, la 4an de auxgusto 1914, la enveno de la germanaj trupoj abrupte finigas tiun gxojan neuxtran periodon. Per la traktato en Versailles, ekvalidonta en 1920, Belgio anigos la regionon.

Sed la esperantista periodo ne restos nur parentezo : Kelmis nun plu sxirmas la kunvenejon de ***Senlime***, internacia esperanto-asocio en Euxregiono Mozo-Rejno, kiu iele vivtenas la Esperantistan ***Amikejo***n !

# ESPERANTO✪

## Eùregiona kalendaro 2006 (2)

### Senlime Esperanto Kalendaro

***Senlime*** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-arangxoj en la Eùregiono Mozo-Rejno.
Gxi aperas rete kaj papere.

«Trilandaj renkontigxoj» estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aù esperanto-grupo en Eùregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aùtune), laùvice en cxiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-cxi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aù aktivajxojn organizitajn aù subtenitajn de komitatanoj. Gxi neniel igxu kompleta kalendaro de esperanto-arangxoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** nun regule okazas cxiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, cxiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro :
Jean-Marie **Jacques**
(jacques@senlime.org).

**08-19** 19h30 BE-Kelmis, Select: preparado de la TLR (ripetado de la teatrajxo).

**09-15** 19h30 BE-Kelmis, Select: finpretigado de la TLR. (+ ripetado de la teatrajxo).

**10-15** 10h00 BE-Kelmis, “Select“ : speciala **trilanda renkontigxo.**
(antaùa aligxo deviga).
Inf.: J-M. Jacques
XX-32-(0)87/33.02.92
jacques@senlime.org

**10-20** 19h30 BE-Kelmis, Select: José **Jacob** prelegos pri «***Madejro, insulo je floroj***» *(2/2).*
Inf. José **Jacob**
XX-32-(0)87/22.10.79

**11-17** 19h30 BE-Kelmis, Select : Didier **Lousberg** prelegos pri «***Optikaj iluzioj***» (vi ne kredos viajn okulojn !).
Inf. Didier **Lousberg**
didierlousberg@versateladsl.be

**12-17** 19h30 BE-Kelmis, Select : tradicia Zamenhof-festo (bankedo, kulturaj programeroj,...).
(antaùa aligxo deviga).
Inf. Mathieu **Schrymecker.**

✪

Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, okazos en 2007 la **03-16, 04-20, 05-18** kaj **06-15.**

**08-19** 19h30 BE-Kelmis, Select: préparation de la TLR (répétition de la pièce de théâtre).

**09-15** 19h30 BE-Kelmis, Select: mise au point finale de la TLR (+ répétition de la pièce de théâtre).

**10-15** 10h00 BE-Kelmis, Select : «**trilanda renkont-igxo» [rencontre des 3 pays]** spéciale 100e anniversaire.
(réservation obligatoire).
Inf.: J-M. Jacques
XX-32-(0)87/33.02.92
jacques@senlime.org

**10-20** 19h30 BE-Kelmis, Select: José **Jacob** parlera de «***Madeire, île aux fleurs***» *(2/2 – avec diapositives).*
Inf. José **Jacob**
XX-32-(0)87/22.10.79

**11-17** 19h30 BE-Kelmis, Select : Didier **Lousberg nous** présentera des «***Illusions d'optique***» (vous n'en croirez pas vos yeux !).
Inf. Didier **Lousberg**
didierlousberg@versateladsl.be

**12-17** 19h30 BE-Kelmis, Select : traditionnelle fête Zamenhof (banquet, intermèdes culturels,…).
(réservation obligatoire).
Inf. Mathieu **Schrymecker.**

✪

Réunions suivantes au Sélect, Kelmis (BE), en 2007 : les **03-16, 04-20, 05-18** et **06-15**.

# 1900-1906 : la tempo de esperantaj pioniroj

**Akeno, la 26an de junio 1816**
***La Franca Imperio de Napoleono disfalis post Waterloo. La partigo teritoria inter la novaj potencoj estis farita sen grava problemo … escepte en eta vilagxo da 256 enlogxantoj, Moresneto, kie kusxis la plej grava tavolo da kalamino el Eùropo.***

Nederlando kaj Prusujo ne povis interkonsenti pri la lima desegno cxe la renkont-punkto de la Moresneta komunumo kaj de tiuj du potencoj. Provizora arangxo, nomita «Traktato pri la limoj» de nun disigas la komunumon Moresnetan en tri teritoriojn : (nederlanda) Moresneto, Prusa Moresneto kaj la «neùtraligita» teritorio Moresneta.

**Nov-Jorko, 25an de februaro 1901**
La unua komerca kompanio posedanta kapitalon da pli da unu miliardo da dolaroj jxus fondigxis hodiaux sub la nomo de «United States Steel Corporation». Gxi estrigxas super 149 sxtalejoj, 84 altfornoj, karbminejoj, pluraj fervojaroj kaj grandegan kvanton da aneksaj industrioj.

**Parizo, 15an de majo 1902**
7 jarojn post la invento de la kino, la franca realigisto Georgo Melies prezentas sian «Vojagxo en la lunon», fikcian filmon 14-minutan kiun la publiko triumfigos, tiel malfermante la vojon al la kinematografia spektaklo.

**Amiens, januaro 1903**
Grupo esperantista jxus kreigxis en Amiens, kies prezidantecon akceptis Jules Verne. La mirindega anticipanto, fine de sia vivo, estis entuziasmigxinta pri la ideo de lingvo universala. Li promesis al siaj geamikoj skribi romanon kien li priskribos la meritojn de esperanto.

**Bruselo, 30an de julio 1903**
Dum la dua kongreso de la Partio Social-Demokrata Partio Rusa (PSDR) en Bruselo, la partio duonigxas, kun unuflanke la bolcxevikoj («majoritatuloj» en la rusa) kaj aliflanke la mencxevikoj («minoritatuloj» en la rusa). La renversfaligo de la caro restas ilia komuna celo.

**Kitty Hawk, 18an de decembro 1903**
Aparato pli peza ol la aero, konstruita de la fratoj Wright, altigxis en la aeroj per siaj propraj rimedoj. Gxi dauxrigis sian flugon dum unu minuto.

**Nov-Jorko, 21an de oktobro 1904**
La urbo Nov-Jorko inauxguras sian metropolan subtrajnon. Gxi tiel sekvas la ekzemplon de Londono kiu sin dotis per la unua subtrajno en la mondo en 1863, poste sekvita de Parizo en 1900 kaj Berlino en 1902.

**Sankt-Petersburgo, 22an de januaro 1905**
Dimancxo rugxa en Rusio : pli ol 10000 laboristoj rusaj manifestas pace antaù la Sankt-Petersburga palaco. Ili deziras prezenti, al la caro Nikolao la 2a, petskribon favore al sociaj kaj politikaj reformoj. Sed la armeo pafadas al la homamaso kaj mortigas pli ol milon da manifestantoj. La gxenerala striko baldaù etendigxas al la tuta Rusio, Pollando kaj Kaùkazio.

**Parizo, 13an de marto 1905**
Francio plifortigas sian politikon pri ekonomia milito kaj blokado de Germanio dekretinte ke cxiu varo el aù al Germanujo estos barita. Tiu dekreto fakte estas respondo al la decido de Germanio, la 4an de februaro, deklaranta militzono la Manika maro kaj la akvoj cxirkauxantaj Francion kaj Britio. La respondo francia fakte estas antaù-arangxita kun la britoj kiuj estis donintaj similajn ordonojn jam la 9an de februaro.

**Amiens, 24an de marto 1905**
Preskaù 5000 personoj cxeestis la entombigon de Jules Verne en la tombejo Magdalena en Amiens. Lia filo Michel Verne publikigos post lia morto plurajn el liaj libroj, ofte rearangxitaj, inter kiuj la romano "La miriga aventuro de la Misio Barzac", en kiu Jules Vernes volis – realige de sia promeso – aliri la temon de esperanto, sed... en la verko fine publikigita, oni ne plu trovos aludojn pri esperanto.

**Bulonjo-cxe-maro, 7an de auxgusto 1905**
Kadre de internacia kongreso, dank'al esperanto, ne malpli ol 688 partoprenantoj el 22 landoj kaj malsamaj gepatraj lingvoj konis la grandegan privilegion interkompreni sen interpretisto, dank'al la lingvo internacia «esperanto».

**Zuriko, 1an de julio 1905**
La fizikisto Albert Einstein publikigas sian « Memuaro pri la malvastigita relativeco» en kiu li demonstras la egalvaloron de maso kaj energio. Tiu malkovro balaas la mekanikajn legxojn de Isaac Newton.

**Bostono, 24an de decembro 1906**
R. A. Fessenden, kiu prezentis en 1900 la unuan «senfadenan telefonon», sukcesis transsendon dudirektan (eksperimentan) de la vocxo inter Skotlando kaj la urbo Brant Rock en Massachussets. La antauxan tagon de Kristnasko, li realigos mondan premieron elsendante mesagxon «Pacon al la bonvolemaj homoj» kaj muzikon, kiun kaptos sxipo en la Karaiboj.

# 1900-1906 : le temps des pionniers de l'espéranto

**Aachen, 26 juin 1816**
L'Empire français de Napoléon s'était effondré après Waterloo. Le partage territorial entre les nouvelles puissances se fit sans gros problème… excepté dans un petit village de quelques 256 habitants, Moresnet, où se trouvait le gisement de Calamine le plus important d'Europe. Les Pays-Bas et la Prusse ne purent s'entendre sur le tracé des frontières au point de rencontre de la commune de Moresnet avec ces deux puissances. Un arrangement provisoire, dit «Traité des Limites» partage désormais la commune de Kelmis en 3 territoires : Moresnet (Pays-Bas), Moresnet prussien et le territoire «neutralisé» de Moresnet…

**New-York, 25 février 1901**
La première Cie commerciale possédant un capital d'un milliard de dollars vient d'être fondée ce jour sous le nom de « United States Steel Corporation ». Elle a la haute main sur 149 aciéries, 84 haut-fourneaux, des mines de charbon, plusieurs réseaux de voie ferrée et une immense quantité d'industries annexes.

**Paris, 15 mai1902**
7 ans après l'invention du cinéma, le réalisateur français Georges Mélies présente son «Voyage dans la lune», un film de fiction de 14 minutes auquel le public fera un triomphe qui ouvrira la voie au grand spectacle cinématographique.

**Amiens, janvier 1903**
Un groupe espérantiste vient d'être créé à Amiens, dont Jules Verne a accepté la présidence. Le prodigieux anticipateur, à la fin de sa vie, s'était enthousiasmé pour l'idée d'une langue universelle. Il promit à ses amis d'écrire un roman où il décrirait les mérites de l'espéranto.

**Bruxelles, 30 juillet 1903**
Au second congrès du Parti social-démocrate russe (PSDR) à Bruxelles, le parti se scinde en deux, avec d'un côté les bolcheviks (« majoritaires » en russe) et de l'autres les mencheviks (« minoritaires » en russe). Le renversement du tsar demeure leur but commun.

**Kitty Hawk, 18 décembre 1903**
Un appareil plus lourd que l'air, construit par les frères Wilburn et Orville Wright, s'est élevé dans les airs par ses propres moyens. Il s'est maintenu en vol pendant une minute.

**New-York, 21 octobre 1904**
La ville de New-York inaugure son métro. Elle suit ainsi l'exemple de Londres qui s'est dotée du tout premier métro au monde en 1863, suivie ensuite de Paris en 1900 et Berlin en 1902.

**Saint-Pétersbourg, 22 janvier 1905**
Dimanche rouge en Russie : plus de 10000 ouvriers russes manifestent pacifiquement devant le palais d'hiver de Saint-Pétersbourg. Ils désirent présenter au tsar Nicolas II une pétition en faveur de réformes sociales et politiques. Mais l'armée tire sur la foule et tue près d'un millier de manifestants. La grève générale s'étend bientôt à toute la Russie, la Pologne et le Caucase.

**Paris, 13 mars 1905**
La France renforce sa politique de guerre économique et de blocus de l'Allemagne en publiant un décret affirmant que toute marchandise en provenance ou en direction de l'Allemagne sera interceptée. Ce décret est en fait une réponse à la décision de l'Allemagne le 4 février de déclarer zone de guerre la Manche et les eaux entourant la France et le Royaume-Uni. La réponse française est en fait concertée avec les britanniques qui avaient donné des ordres similaires dès le 9 février.

**Amiens, 24 mars 1905**
Près de 5000 personnes assistent aux funérailles de Jules Verne au cimetière de la Madeleine à Amiens. Son fils Michel Verne publiera après sa mort plusieurs de ses livres, souvent remaniés, dont le roman "L'étonnante aventure de la Mission Barzac", dans lequel Jules Vernes voulait – en exécution de sa promesse - aborder le thème de l'espéranto, mais... dans l'ouvrage qui sera finalement publié, on ne trouvera plus d'allusions à l'espéranto.

**Boulogne-sur-mer, 7 août 1905**
Dans le cadre d'un congrès international, grâce à l'espéranto, pas moins de 688 participants de 22 pays et langues maternelles différentes connurent l'immense privilège de se comprendre sans interprète, grâce à la langue internationale «espéranto».

**Zurich, le 1er juillet 1905**
Le physicien Albert Einstein publie son « Mémoire sur la relativité restreinte » dans lequel il démontre l'équivalence de la masse et de l'énergie. Cette découverte balaie les lois de la mécanique d'Isaac Newton.

**Boston, le 24 décembre 1906**
R. A. Fessenden, qui présentait en 1900 le premier «téléphone sans fil», réussit une transmission bidirectionnelle (expérimentale) de la voix entre l'Écosse et la ville de Brant Rock, dans le Massachussets. La veille de Noël, il réalisera une première mondiale en diffusant un message «Paix aux hommes de bonne volonté» et de la musique, que captera un navire dans les Caraïbes.

# Verviersa Angulo

## Verviersa Esperanto Grupo

# Il y a 100 ans, à Verviers…

**Komité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: R. Demarche
22 Rue Donckier
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.68.18

Secrétaire: J.-M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.)
M. Delforge
16 Rue des Glacières
6001 MARCINELLE

---

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants de l'Eurégion sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant dès aujourd'hui l'une des cotisations suivantes au compte
n°: **000-0245571-64**
IBAN: BE29 0000 2455 7164
BIC: BPOTBEB1
de:
Esperanto grupo
22 Rue Donckier
BE-4800 VERVIERS

*La cotisation de **Senlime** est restée inchangée depuis sa création, il y a 13 ans.*

**D'avance, merci à tous !**

**A.P.E. 2006 12 €**
**U.E.A. 2006 56 €**
**Senlime 2007 10 €**

**en indiquant le nom du membre cotisant, le bénéficiaire et l'année:**
***«cotisation de …. pour ….».***

La **Esperantista Grupo Verviersa** estas fondita en 1906 (ecx se statutoj estus aperintaj nur en 1908) kaj havis sian sidejon cxe Harold E. PALMER, Verda Placo 20. Kiel instruisto, tiu unua «gxenerala sekretario» de la «**Esperantista Societo Verviersa**» estis la aùtoro de metodo por lernado de esperanto aperinta cxe eldonisto bone konata de la belgaj esperantistoj : A. J. WITTERYCK-DELPLACE (Brugxo). Unua reklama anonco aperis en «Lingvo Internacia».

La Verviersa gazeto «Temps jadis» [Iamaj Tempoj] konfirmas la cxeeston de esperantistoj en Verviers en 1906. Tiu grupo kontraùstaros la oficialan adopton de esperanto en Neùtrala Moresneto. Notendas ke la senkulpige citita motivo estis strange nuntempa : se esperanto igxus la lingvo de iu nacio (ekzemple Eùropo), gxi perdus sian statuton de neùtrala lingvo kaj vidus malkreski gxiaj sxancoj esti mondskale adoptita. Cxu vere aù false ?

La 30-an de junio 1907, la komitato de la grupo konsistos el E. MATHIEU, strato de la Monto 45 (instruisto), Harold E. PALMER (sekretario), kaj G. LANGE, el Ensival. Membroj : Sinjorinoj Jeanne XHOFFER kaj Jeanne FLORENCE, Sinjoroj DELBASCOUR kaj Joseph PIRNAY (kiu, logxinte straton Xhavée 9, igxos sekretario de la grupo en 2008).

J-M. **Jacques**

Le **Groupe espérantiste de Verviers** a été fondé en 1906 (même si ses statuts dateraient de 1908) et avait son siège chez Harold E. PALMER, place Verte 20. Comme professeur, ce premier «secrétaire général» de la «**Société Espérantiste de Verviers**» [Esperantista Societo Verviersa] était l'auteur d'une méthode d'apprentissage de l'Espéranto parue chez un éditeur bien connu des espérantistes belges: A. J. WITTERYCK-DELPLACE (Bruges). Une première annonce publicitaire parut dans «une langue internationale» [Lingvo Internacia].

La revue Verviétoise «Temps Jadis» confirme la présence d'espérantistes à Verviers en 1906. C'est ce groupe qui s'opposera à l'adoption officielle de l'espéranto à Neu-Moresnet. Il faut noter que le motif invoqué était curieusement actuel : si l'espéranto devenait la langue d'une nation (l'Europe, par exemple), il perdrait son statut de langue neutre et verrait ses chances d'adoption au niveau mondial diminuer. Vrai ou faux ?

Au 30 juin 1907, le comité du groupe se composera de E. MATHIEU, rue de la Montagne 45 (professeur), Harold E. PALMER (secrétaire), et G. LANGE, d'Ensival. Membres : Mesdames Jeanne XHOFFER et Jeanne FLORENCE, Messieurs DELBASCOUR et Joseph PIRNAY (qui, habitant rue Xhavée 9, deviendra secrétaire du groupe en 2008).

J-M. **Jacques**